# Gvidilo por

# **Tendaraj tagoj**

(por kajero du)

Verkita de Stefan MacGill
Ilustrita de Pavel Rak

(komencita: nov. 99)



## Enkonduko

Bonvenon al la elektronika formo de la gvidilo por instruistoj, apoge al la dua eldono (1997) de la dua kajero de "Tendaraj tagoj". Tiu tri-kajera serio estas unu el la lerniloj rekomendataj de ILEI por la projekto "Interkulturo". La gvidila materialo estas alirebla en PDF-formato en Edukado.net kaj en la hejmpaĝo de ILEI sub "Agado: Eldonaĵoj":

http://www.ikso.net/ilei/

Okaze de la aperigo de la gvidilo en novembro 1999, ni prezentas materialon por lecionoj 1-10. Nova materialo aperos kiam eble, inkluzive de ilustritaj kaj bildaj ekzercoj. Oni povas mendi de ILEI fotokopian kolekton de la aktuala stato de la materialo kontraŭ 3 EUR (5 IRKP). Mendu de la liga libroservo aŭ de estraranoj, kiuj tenos kopieblajn kompletojn.

Vi rajtas elprinti kaj kopii la tekstojn por via propra uzo, sed vi ne rajtas komerco-skale distribui aŭ vendi ilin. La kopirajto restas kun ILEI kaj la verkinto(j). ILEI konsideros ĉu post kompletigo eldoni la gvidilon libro-forme. Se vi verkos mem ekzercojn aŭ kreos ludon aŭ aktivaĵon por iu leciono, bonvolu sendi tion papere aŭ elektronike al la verkinto:

Stefan MacGill <stefan.macgill@galamb.net>

Tiuj povos aperi en la organike kreskanta gvidilo, kune kun agnosko de la verkinto. Bonvenaj ankaŭ estas atentigoj pri problemaj punktoj en lecionoj por studentoj kun difinita denaska lingvo, kaj ajnaj ideoj por vivigi kaj ampleksigi la enhavon de la kajero.

Ni esperas, ke la ekzercoj kaj konsiloj faciligos vian instruan taskon.

# ENHAVO


1. Mia unua poŝtkarto ... 3
2. Kanotoj por la tendaranoj ... 5
3. Per trajno, kun Veroniko, kun bufedo! ... 8
4. Supren kaj suben: tendaranoj ludas ... 9
5. La vekhorloĝoj sonas ... 10
6. Serĉu la sid-lokojn ... 11
7. Komforta eraro ... 12
8. Trovu la vojon! ... 14
9. Navigu komputile! ... 17
10. En la besto-ĝardeno ... 19

RESPONDOJ AL EKZERCOJ ... 21

# 1. Mia unua poŝtkarto

**Novaj verboj:**
telefoni (-on), permesi (-on), prezenti -on, lerni –on, uzi (-on)

**Aliaj novaj vortoj:**
poŝt-karto, letero, patr(in)o, frat(in)o, familio, hundo, komputilo, lernejo, ĝardeno, eraro, granda, amuza, jara, fora, hejme, mia, nia, niaj

**Gramtikaj celoj:**
1. Enkonduki du personajn pronomojn en singularo: mia, nia. Plurala formo "niaj" uzita.
2. Prezenti akordigon de adjektivo kun substantivoj je nombro. –aj –oj.


**Komunikaj celoj:**
1. Skribe komuniki per simpla sinprezenta poŝtkarto aŭ letereto.
2. Rakonti pri sia familio kaj diri sian aĝon.
3. Legi manskribitajn tekstojn.

**Ekzerco 1: Transformu la frazojn:**

***Ekzemple:*** Mi havas biskviton → La biskvito estas mia.




1. Mi havas lakton.
2. Mi havas bananon.
3. Mi havas radon.
4. Mi havas birdon.
5. Mi kaj Sonja havas biciklon.
6. Mi havas tri pomojn.
7. Petro kaj mi havas ludo-urson.
8. Mi havas komputilon.
9. Mi kaj Pandoro havas ses katojn.



Faru ankau la inverson. Instruisto diru: "La pomo estas mia." Lernanto: "Mi havas pomon."

**Konsiloj:**
Por ekzerci "mia" ne timu enkonduki ankau "via"

**1. Parolu pri la hejmo: Demandu: "Kion vi havas hejme?" Ekzemple:**

**Gvidanto:** Kion vi havas hejme?
**Lernanto:** Mi havas katon hejme.
**G:** Ĉu via kato estas bela kaj amuza?
**L:** Certe.
**G:** Ĉu vi havas helikopteron hejme?
**L:** Certe ne! Sed mia fratino havas biciklon.
**G:** Ĉu ĝi estas rapida?
**L:** Certe, jes.

**2. Kio estas via?**
Grupanoj desegnu kelkajn objektojn kaj skribu la propran nomon sur la objektoj, kiujn ili desegnis. Poste miksu la objektojn. Demandu:

**G:** Nikola, kion vi havas?
**N:** Mi havas auton.
**G:** Ĉu ĝi estas via?
**N:** Jes, ĝi estas mia. Mi desegnis ĝin.



**G:** Petra, kion vi havas.
**P:** Mi havas ĉerizojn.
**G:** Ĉu la ĉerizoj estas viaj?
**P:** Ne, ili ne estas miaj. Georgo desegnis ilin. Ili estas de li.
**G:** Karlo, kion vi havas?
**P:** Mi havas jakon kaj televidilon.
**G:** Ĉu ili estas viaj?
**P:** La televidilo estas mia, sed la jako estas de Anita.




**3. Lernantoj prezentu siajn familiojn kaj domojn.**

Kiom da familianoj, kiuj estas la aĝoj. Kiuj havas kion?

**4. Telefonu!**

*Grupanoj elpensu telefon-numerojn; unu lernanto skribu klasan telefon-libron. Poste babilu:*

**Mira:** Mi telefonos! Jen la numero: tri sep kvar, du ok du kvin. Son! Son!
**Fredo:** Ha! Tiu estas mia numero! Saluton! Kiu parolas?
**Mira:** Mira parolas. Ĉu vi estas Fredo?
**Fredo:** Jes.
**Mira:** Fredo, ĉu vi venos kun mi al la kinejo morgaŭ?
**Fredo:** Ho, jes, estos bona filmo morgaŭ! Mi venos.
**Mira:** Bone, mi vidos vin en la lernejo.

**Kluts:** Mi telefonos al Nora! Jen la numero: kvar unu sep, ok du kvin nulo. Son! Son!
**Klaus:** Saltuon. Kiu parolas?
**Kluts:** Mi! Via voĉo estas stranga! Ĉu vi estas malsana?
**Klaus:** Sed kiu vi estas? Kiu estas 'Mi?"
**Kluts:** Mi! "Mi" estas mi. Kompreneble! Kluts.
**Klaus:** Kluts? Mi ne havas amikon kun la nomo Kluts. Al kiu vi telefonis?
**Kluts:** Al Nora, kompreneble.
**Klaus:** Nora ne loĝas ĉi tie. Vi ne-bone elektis.
**Kluts:** Ĉu tio ne estas kvar unu sep, du kvin nulo?
**Klaus:** Ne. Mia numero estas kvar unu sep, ***tri*** kvin nulo.
**Kluts:** Ho, pardonu! Sed … via voĉo estas ***vere*** stranga!

**Ludo: La mesaĝo iru kiuvoje?**

Preparu kvar kartojn; unu kun bildo de letero, unu kun poŝtkarto, unu kun telefono kaj unu kun komputilo. Gvidanto (**G**) levu unu (ekz. la poŝtkarton), kaj diru al unu lernanto:

**G:** Jen mesaĝo al Jano. Jano, ĉu vi havas komputilon?
**Jano:** Ne mi ne havas komputilon.
**G:** Ve. Ĉu vi havas telefonon?
**Jano:** Ne, ni ne havas telefonon hejme.
**G:** Ve. Ĉu mi uzu leteron au poŝtkarton?
**Jano:** Ĉu la mesaĝo estas longa aŭ mallonga?
**G:** La mesaĝo estas mallonga.
**Jano:** Do, uzu poŝtkarton.



**Leterskribado:**
Aktoru la sendadon de letero: Jen plumo, jen papero. Nun mi skribas la leteron. Ĝi estas preta. Jen koverto kaj poŝtmarko. Mi gluas la poŝtmarkon. Mi skribas la adreson. Mi skribas la reven-adreson. Mi iras al la poŝt-kesto. Mi ĵetas ĝin en la poŝtkeston. Ĝis revido, letero!

Faru samon pri la pretigo kaj sendo de komputila ret-letero. Ĉu la konekto senprobleme funkcios?

# 2. Kanotoj por la tendaranoj

**Novaj verboj:**
boati, kanoti, ekskursi.
rigardi -on, peti -on, elekti -on, gvidi -on, preferi -on, prepari -on

**Aliaj novaj vortoj:**
kanoto, tipo, libera, longa, bela, sabato, dialogo, por, mal-

**Gramtikaj celoj:**
1. Enkonduki la personajn pronomojn en singluaro: mia, via, lia… nia, ilia.
2. Akordigi adjektivojn kun substantivoj je nombro kaj akuzativo: –aj –oj, -an –on.

**Komunikaj celoj:**
Esprimi apartenon kaj preferojn. Afable peti. Diri kvalitojn de objektoj.

---


**Ekzerco 1: Ne nur unu!**

Transformu la frazojn de unu al la nombro inter la krampoj. Aldonu –j.

*Ekzemplo:* La listo estas longa (tri) → La tri listoj estas longaj.

1. La kanoto estas granda (ses)
2. La letero estas amuza. (ok)
3. La knabo estas dek-jara. (kvar)
4. La triciklo estas tri-rada (du).
   (Do, kiom da radoj entute?)
5. La buso estas elektra (naŭ)
6. La lokomotivo estas vapora (kvin)
7. La knabino estas lerta. (dek)
8. La sandviĉo estas bona (sep)
9. La floro estas bela (multaj)







**Ekzerco 2: Nur pronome!**

Ni donas frazon kun 'por'. Unue, uzu posedan pronomon fine. Due, diru la tutan frazon kun nur pronomoj! Havu bildojn de famuloj por aldoni al la ekzerco!

Ekzemplo: La kato estas por Natalio.
La kato estas ŝia. Ĝi estas ŝia.


1. La granda kanoto estas por Habibo.
2. La biskvitoj estas por la urso.
3. Boato kvar estas por Karlo kaj Aniko.
4. La letero estas por mi.
5. Kanoto du estas por Veroniko kaj mi.
6. La ludo-domo estas por vi.
7. "Michael Jackson" estas por Brenda.
8. La pomoj estas por la tendaranoj.
9. "Madonna" estas por Tomaso.
10. La aŭto estas por Mateo.
11. "Amplifiki" estas por Sandra.
12. La jupo kaj la bluzo estas por Adelo.
13. La lud-kamiono estas por Rikardo kaj Dimitro.
14. "La estraro de UEA" estas por Veroniko. :-)





**Ekzerco 3: Transformu la frazojn:**

*Ekzemplo:*
Mi havas biskviton, kiu estas bongusta → Mi havas bongustan biskviton.



1. Mi aĉetos kanoton, kiu estas longa.
2. Mi deziras kukon, kiu estas bongusta.
3. Mi vidas aviadilon, kiu estas rapida.
4. Mi svingas kusenon, kiu estas tru-hava.
5. Mi levas la flagon, kiu estas esperanta.
6. Mi indikas la beston, kiu estas granda.
7. Mi ŝatas mian komputilon, kiu estas elektra.
8. Mi vizitas mian amikon, kiu estas kara.
9. Mi donas florojn, kiuj estas belaj, al mia amikino

**Konsiloj:**

1. Disdonu objektojn au bildojn de objektoj.
   Ĉiu posedu du aŭ tri nomeblajn objektojn.
   Demandu kion oni havas: Kiu havas pomon. Karlo, kion vi havas? Karolina, ĉu la nomo de via pupo estas Jana? Petro, ĉu via biciklo estas rapida?

2. Parolu pri ekskursoj, vizitoj al maro, rivero aŭ lago, iro per boatoj.

3. Arigu multajn konatajn objektojn. Disdonu ilin. Lernantoj uzu afablajn frazetojn: Mi petas, Mi dankas vin. Uzu: por vi. Kion vi petas, Kion vi deziras, Kion vi elektas, Ĉu vi petas la tigron? Kiu petas la tigron… ktp.


**Ludo: Riveroj de la mondo**

Grupanoj havu atlaso(j)n por konsulti. Pretigu sesdek kartojn kun la subaj informoj. Estas naŭ riveroj kaj ses informoj por ĉiu rivero.

1. Nomo de la rivero.
2. La kontinento en kiu ĝi troviĝas (kelkaj estas samaj!)
3. La loko aŭ lando de kie la rivero fluas.
4. La lando(j) tra kiu(j) la rivero fluas.
5. Unu urbo, sur la bordo de la rivero.
6. La maro aŭ oceano al kiu fluas la rivero.

Miksu la kartojn kaj disdonu kartojn al viaj klasanoj. Eble la kursanoj havos pli ol unu karton. Se jes, ne disdonu ĉiujn. La disdonado okazu kun parolado en Esperanto:

“Tiu karto estas por vi.” “Dankon”
“Tiu karto estas via” “Mi dankas vin”
“Tiu karto estas ŝia. Bonvolu doni ĝin al ŝi”
“Ĉu vi havas karton?”
“Ne”
“Bone, jen por vi”.




Poste grupanoj vagas, komparante kartojn, kaj demandante, ĝis ili formas la ĝustajn grupojn, kun ĉiuj kartoj pri unu rivero. La unua grupo kun karto-kompleto gajnas. Se neniu sukcesos, disdonu pli da kartoj, po unu al ĉiu. Plurfaru tion, ĝis iu kompletigas grupon.


| ***Rivero*** | ***Kontinento-partoj:*** | ***Fluas de:*** |
|---|---|---|
| 1. Amazono | Ameriko (suda) | Peruo (la Andoj) |
| 2. Bramaputro | Azio (suda) | Ĉinio (la Himalajoj) |
| 3. Danubo | Eŭropo, (centra) | Nigra arbaro (Germanio) |
| 4. Jangzo | Azio (orienta) | Ĉinio (la Himalajoj) |
| 5. Misisipo | Ameriko (norda) | Roka montaro (Rockies) |
| 6. Nilo | Afriko (nord-orienta) | Burundio |
| 7. Rejno | Eŭropo (okcidenta) | Svislando |
| 8. Vajkato *[Waikato]* | Oceanio (Nov-Zelando) | Lago Taŭpo |
| 9. Volgo | Orienta Eŭropo | Norda Rusio |


| ***Fluas apud:*** | ***Fluas tra:*** | ***Fluas al:*** |
|---|---|---|
| 1. Manaŭso | Peruo, Kolombio, Brazilo | La Atlantika Oceano |
| 2. Dakao | Ĉinio, Hinda Unio, Bangladeŝo | La Hinda Oceano |
| 3. Budapeŝto | Aŭstrio, Slovakio, Hungario, Kroatio, Serbio, Rumanio, Bulgario, Ukrainio | La Nigra Maro |
| 4. Vuhano | Ĉinio | La Orient-ĉina Maro |
| 5. Nov-Orleano | Centra Usono | La Golfo de Meksikio |
| 6. Kairo | Ruando, Tanzanio, Ugando, Sudano, Egiptio | La Mediteranea Maro |
| 7. Kolonjo | Germanio, Nederlando | La Norda Maro |
| 8. Hamiltono | Nov-Zelando (Norda insulo) | La Tasmana Maro |
| 9. Volgograd | Rusio | La Kaspia Maro |


**Enigmo:**
**Kiu boato estas por kiu?**


Jen kvar boatoj kaj kvar personoj.
Kiu boato estas por kiu?
Legu la ses frazojn sube:




1. Boato unu ne estas por la persono, kiu portas ombrelon.
2. Boato du ne estas por la persono inter Aniko kaj Natalio.
3. Boato tri estas por knabino.
4. Boato kvar ne estas por la persono, kiu portas tendon.
5. Boato du estas por la persono, kiu ridetas.
6. Boato tri ne estas por la persono, kiu portas fiŝojn.

Respondo fine de la gvidilo

# 3. Per trajno, kun Veroniko, kun bufedo!

**Novaj verboj:**
veturi, promeni, vojaĝi, pravi, trafi -on

**Aliaj vortoj:**
tag-nomoj, semajnfino, mateno, vespero, vagono, besto, simio, ĝirafo, serpento, leono, ekskurso, banano,kokoso, piedo, aŭ, diversa, komuna, tro, kiam.


**Gramtikaj celoj:**
1. Enkonduki *per*, kontraste kun *kun*. Enkonduki *kiam*. Konstrui frazojn kun multaj
2. prepozicioj. Firmigi la komprenon, ke prepoziciaj frazeroj ne bezonas akuzativon.


**Komunika celo:**
Precizigi informojn pri irado: en akompano (kun), uzante rimedon (per), en iu tempo-punkto (kiam), por fari ion (agon).

---

**Skribado kaj Dialogado: Kien vi iros?**
Ĉiu skribu frazon kun donitaj elementoj, ekz. *Kiu, Kun, Per, Kien, Kiam, Faros.* Unue gvidanto, poste lernantoj, demandu grupanojn. Ĉiu nova respondo devas ripeti la jam donitajn informojn (ne nepre en la sama vicordo)!

**Gvidanto:** Kun kiu vi iros?
**Lernanto:** Mi iros kun Petro.
**G:** Per kio vi iros?
**L:** Mi iros kun Petro, per buso.
**G:** Kien vi iros?
**L:** Mi iros kun Petro, per buso al la kinejo.





**G:** Kiam vi iros?
**L:** Mi iros morgaŭ kun Petro al la kinejo per buso.
**G:** Kion vi faros en la kinejo?
**L:** Mi iros morgaŭ kun Petro al la kinejo per buso kaj ni rigardos filmon!

*Kun malpli fortaj lernantoj, komencu per nur tri eroj, poste aldonu la kvaran kaj kvinan.*

### *Kartludo:*
Preparu kartojn kun bildo-grupoj. Simile, komencu per tri grupoj, poste aldonu pliajn. La subjekto de la frazo ĉiam estu *Mi*. Desegnu ekzemple ok akompanantojn. Desegnu ok transportilojn. Desegnu ok tago-kartojn (1 = lunde, 2 = marde... 6+7 = semajn-fine). Desegnu ok vojaĝ-celojn. Desegnu ok agojn. Donu al ĉiu unu karton el ĉiu kategorio. La grupanoj devas formuli la ĝustan frazon laŭ siaj kartoj.

**Pli interesa ludo:** Miksu la kartojn, ĉiu laŭvice prenadu po unu. La unua ludanto kapabla formuli frazon per unu karto el ĉiu kategorio gajnas. (Amuze estos la mis-kombinoj)

**Ankoraŭ pli interesa ludo:** Faru same, sed aldonu kelkajn instrukciajn kartojn, ekzemple: *Prenu du kartojn, Donu unu karton al via dekstra najbaro* (do, vi elektas ĝin), *Prenu unu karton de via dekstra najbaro* (laŭ hazarda elekto), ktp.

**Kiam vi estos en la naĝejo?**
*Ses homoj donas informojn:*

A: Mi estos tie inter la dua kaj la sepa horo.
B: Mi estos tie inter la naŭa kaj la deka.
C: Mi estos tie inter la unua kaj la naŭa.
Ĉ: Mi vizitos ĝin de la kvara ĝis la sesa.
D: Mi estos tie inter la tria kaj la sepa horo.
E: Mi estos en la naĝejo nur inter la dua kaj la tria.

1. Kiu estos tie je la oka?
2. Kiuj estos tie je la kvina?
3. Kiu alvenos, kiam C foriros?
4. Kiujn vidos A tie?
5. En kiu horo foriras du el la homoj?
6. En kiu horo alvenas du el la homoj?
7. Kiam estas 4 el la homoj tie? 3? 2? 1?

# 4. Supren kaj suben: tendaranoj ludas

**Novaj verboj:**
bezoni -on, kompreni -on, (ĵeti -on).

**Aliaj novaj vortoj:**
ĵet-kubo, spaco, markilo, komenco, fino, tabula, supren, suben, dekstren, maldekstren.



**Gramatikaj celoj:**
1. Uzi –N por indiki movon al, kun adverboj: supre, supren.
2. Firmigo de imperativo, numeroj post dek, transportiloj

**Komunikaj celoj:**
1. Doni vort-trezoron kaj modelajn frazojn por tabul-ludoj.
2. Kapabli diri, kion oni bezonas.

---

**Ekzerco: Kion oni bezonas?**

Jen dek kvar frazoj. En la frazo, oni bezonas ion. Kion? Elektu el la respondoj en la dekstra kolumno. Ili estas en malbona ordo – en inversa alfabeta ordo, fakte! Kaj unu list-ero ne estas bezonata! Se vi bone solvis la ekzercon, kaj vi prenos la komenc-literojn de la bezonataj objektoj, vi formos sekretan du-partan vorton. Skribu tion en la spacoj maldekstre.Tio estas la premio por la persono, kiu gajnas la tabul-ludon!

| ***KIO OKAZAS?*** | ***KION ONI BEZONAS?*** |
|---|---|
| | urson |
| ____ 1. Adelo estas malsata. | telferon |
| ____ 2. Karlo estas sola kaj malgaja en la arbaro. | serpenton |
| ____ 3. Tendarano estas malsana. | sandviĉon |
| ____ 4. Aŭtoj kaj busoj estas tro multaj kaj tro fumas. | remilon |
| ____ 5. Habibo kaj Dimitro kanotos. | ombrelon |
| ____ 6. Mateo veturos al la urbo nokto-meze. | oleon |
| ____ 7. La tendaranoj ludos tabul-ludon. | limonadon |
| ____ 8. Natalio fondos besto-ĝardenon. | kuraciston |
| ____ 9. La grupo perdis la vojon en la arbaro. | kompason |
| ____ 10. Veroniko flugos al Nov-Jorko. | katastrofon |
| ____ 11. Rikardo iros la la supro de monto, sed ne grimpos. | ĵet-kubon |
| ____ 12. La aŭto de Mateo faras strangajn bruojn. | elektrajn tramojn |
| ____ 13. Adelo estas soifa. Volonte Adelo trinkos… | aviadilon |
| ____ 14. La tendaranoj ekskursas, sed pluvas. | aŭton. |

**Dialogu!**
Parolu pri la supraj bezonoj, inventu novajn:

**Adelo:** Mi estas malsata!
**Mateo:** Ĉu vi bezonas kompason?
**Adelo:** Ne, kompreneble ne!
**Mateo:** Ĉu vi bezonas remilon?
**Adelo:** Ne, kompreneble ne!
**Mateo:** Ĉu vi bezonas sandviĉon?
**Adelo:** Nu, jes, sed…
**Mateo:** Sed, kio…?
**Adelo:** Mi bezonas dek sandviĉojn!

**Konsiloj:**

Lernantoj kreu la proprajn tabul-ludojn kaj ludu ilin. Desegnu grandan kaj faru demandojn pri tio, similaj al tiuj en la libro.

Lernanto tenu objekton kaj movu ĝin laŭ la instrukcioj de alia lernanto: supren, suben, dekstren, maldekstren, al via kapo, al via ŝultro,super via kapo, al via dekstra mano, al via maldekstra kruro…

# 5. La vekhorloĝoj sonas




**Novaj verboj:**
ronki, soni, pepi, kvaki, bleki, rori, krii, kuri, rapidi.
atendi -on, lavi -on, kombi -on, brosi -on.

**Aliaj novaj vortoj:**
vek-horloĝo, tagmezo, nokto, nokte, dento, vizaĝo, hararo, ban-ĉambro, vico, sen-sona, silenta, je, gratulon.

**Gramatikaj celoj:**
1. Uzi la nedifinitan prepozicion "Je" en tempaj esprimoj.
2. Formi du-partajn verbojn el prefikso kaj verba radiko.

**Komunikaj celoj:**
1. Nomi plenajn horojn kaj diri kio okazas tiam.**.**
2. Paroli pri la matenaj rutinoj
3. Priskribi diversajn sonojn.

---

**Ekzerco: Du-partaj verboj**

Jen kvar prefiksoj kaj kvar verboj. El tiuj vi povas konstrui dek ses novajn verbojn. La verboj iru en la spacojn en la frazoj sube. La unua estas farita (preta) por vi.

| | |
|---|---|
| RE- | IROS |
| EL- | PORTOS |
| KUN- | VOKOS |
| AL- | ĴETOS |

1. La novaj gantoj de Rikardo estas tro malgrandaj. Do, lunde, li ***re-portos*** ilin al la butiko.
2. Nia familio ekskursos, sed la hundo ne ________.
3. La mont-grimpistoj ______ la supron de la norda flanko.
4. La filmo estis tre bona, do sabate ni _______ kaj rigardos ĝin denove.
5. Certe ni malsatos, do ni _________ kukojn kaj biskvitojn.
6. Se vi krios kaj parolos laŭte en la kinejo, oni ________ vin.
7. La tukoj estas malpuraj. Mi _______ purajn el la lavejo.
8 La tendaranoj kolektos juglandojn (nuksojn). Ili ______ ilin en un grandan amason.
9. "Venu al mi!" Karlo _______ la urson el la arbaro.
10. Ĵetu al mi la pilkon kaj mi _______ ĝin al vi.
11. Jen granda problemo. Ni ______ la parlamentanojn kaj ili decidos.
12. Ili iris al la rivero sen la remiloj, do mi ________ ilin.
13. Vi forgesis la remilojn. Venu apud la bordo kaj mi ______ ilin al vi.
14. La suno brilas denove, do ni ______ kaj ludos ekstere.
15. Atendu ekster la kuirejo. Mi _______ vin kiam la kuko estos preta.
16. La rubujo estas plena kaj malbon-odora, do mi ________ ĝin el la domo.

**Konsiloj:**
Lernantoj parolu pri la matena rutino en semajna kaj semajn-fina kaj feria tago. En kiu horo ili faras kion? Uzu veran aŭ didaktikan horloĝon kaj demandi la horon. Faru tabelon: Kiu faras kion en kiu horo. Poste starigu demandojn laŭ tio.

# 6. Serĉu la sid-lokojn

**Novaj verboj:**
ser¤i -on,  svingi -on, perdi –on, erari, manki, fajfi.

**Aliaj novaj vortoj:**
informo, minuto, kajo, bileto, konduktoro, momento, ordo, problemo, tempo, lasta, plena, ĝusta, sama, rapida, ekspresa, halta, komforta, rezervita, mem, bedaŭrinde.

**Gramatikaj celoj:**
Ordaj numeraloj en aliaj kuntekstoj. Akordigo de adjektivoj nombre kaj kaze:
-aj, -oj, -ajn -ojn.

**Komunikaj celoj:**
Legado de horaroj kaj inform-tabuloj. Aĉetado de biletoj, trovado de lokoj en transportilo.

---

## Dialogu: Perdita!



**Petro:** Ho, ve! Mi perdis mian ludo-trajnon.
**Veroniko:** Kie vi laste vidis ĝin?
**Petro:** Mi laste vidis ĝin hieraŭ, en la ludo-ĉambro.
**Veroniko:** Kaj ĉu ĝi estas tie nun?
**Petro:** Ne.
**Veroniko:** Kie vi jam serĉis?
**Petro:** En la lud-ĉambro, ekster la lud-ĉambro, inter la tendoj…
**Veroniko:** Ĉu vi serĉis en la kuirejo?
**Petro:** Ne. Mi serĉos tie nun! *(forkuras, serĉas, krias).* Ha, jes! Jen ĝi. Mi trovis ĝin! Dankon, Veroniko!


*Jen simpla dialogo. Ripetu la dialogon kun la sekvaj informoj:*

| Kiu perdis? | Kiu proponas? | Kion perdis? | Kie serĉis? | Kie ne serĉis? |
|---|---|---|---|---|
| Rikardo | Mateo | brak-horloĝon | ĝardeno, herbejo | lit-ĉambro |
| Natalio | Adelo | vortaron | kuirejo, manĝejo | biblioteko |
| Urso | Karlo | biskvitojn | monto, arbaro | kaverno |
| Habibo | Dimitro | kanoton | poŝo, dormejo | insulo |
| … | | | | |

**Demandoj:**
1. Kiu estas la tria tago de la semajno?
2. Kiu estas la sepa tago de la semajno?
3. Ĉu mardo estas la dua tago de la semajno?
4. Ãu vendredo estas la kvara tago de la semajno?
5. Kiu estas via unua lerneja stud-horo lunde?  …marde, …merkrede…
6. Kiu estas via lasta lerneja stud-horo vendrede? … lunde? …
7. Ĉu februaro estas la dua monato de la jaro?
8. Ĉu oktobro estas la oka monato de la jaro?
9. Ĉu Sankta Nikolao venas al vi en la lasta monato de la jaro?




**JANKO serĉas JAKON!**




# 7. Komforta eraro

**Novaj verboj:**
trovi -on, kontroli (-on), (montri -on), kalkuli -on, vivi, babili, silenti, ne gravas

**Aliaj novaj vortoj:**
poŝo, sekundo, prezo,multaj, facila, alia, fuma, denove, rapide, tie, plus, minus.

**Gramatikaj celoj:**
1. Firmigi la uzadon de transitivaj verboj.
2. Firmigi la agordigon de adjektivoj.

**Komunikaj celoj:**
1. Paroli pri perdado, serĉado kaj trovado de objektoj.
2. Paroli pri mis-kalkulado.
3. Esprimi sin en embarasaj situacioj.

---

**Ekzerco 1: Mankantaj vortoj:**


Unu vorto mankas en la subaj frazoj. Kiu? Poste, skribu la komenc-literojn de la mankintaj vortoj en la kestoj kaj vi vidos sekretan vorton. Ĝi indikas ion, kion oni bezonas por vojaĝo.

1. _____ En la trajno ne estas restoracio, sed estas __________.
2. _____ "De kiu kajo iras nia trajno?" "Rigardu la ______-tabulon sur la muro."
3. _____ La vagono estas plena. Ne restas _________ lokoj.
4. _____ La tendaranoj _______ la vagonon kaj serĉas la rezervitajn sid-lokojn.
5. _____ Iŝtvano _______ la lokon dudek unu kaj eksidis.
6. _____ Veroniko forgesis kalkuli sin mem. Do, ĉio estis en ______.
7. _____ "Kie estas sidloko dek du?" ____ ĝi, inter dek unu kaj dek tri."
8. _____ Veroniko kalkulis la tendaranojn. Ŝi kalkulis nur ______ personojn.


☐☐☐☐☐☐☐☐


## Krucvort-enigmo

### *Horizontale*



1. Ili eniros la trajnon, sed Roĝero ne _______ sidlokon kvardek du.
7. La tendaranoj iris kun kanotoj kaj ili ekskursis _______.
8. La tendaranoj ___as la katon Tuktruk.
9. Usono kaj Kanado estas en _____-Ameriko
10. Tuktruk estas la ______o de la tendara kato.
12. Tio estas loko kun akvo kaj palmarboj en dezerto.
14. Petro, ne ludu per la biletoj, vi _______ ilin.
16. Tendaranoj! Staru en unu linio! Mi faros _______ kalkulon.
17. La Danubo fluas _____ Slovakio kaj Hungario.
18. La telefono _____as!
20. La araneo venas el eta ____o. (vidu lecionon 46)
22. Jen Ivo kun remilo. _____ ____ faras?
25. Ni salutis la ________ sinjoron. Li estas okdek jara.
26. Rok-eta.
27. La deksesa litero de la esperanta alfabeto. La kreinto de Esperanto: __ __ Zo.






### *Vertikale*

1. Trajno estas ___________. Same aviadilo kaj buso.
2. “Mi estas vin ama, Eterne la sama.” Jen ______!
3. Kio venis unua? La kokino aŭ la ___o?
4. En la giĉeto oni ________ biletojn de la oka matene ĝis la kvina vespere.
5. _____ estas tre valora metalo.

6. Venas la konduktoro! Iŝtvano rapide _______ la biletojn.
11. Malkontenta kato eble gratos, hundo eble _____os. (vidu lecionon 16)
13. Sen _______, la pantalono eble falos suben! (vidu lecionon 20 de la unua kajero)
15. La unua poŝtkarto de Dimitro en leciono unu enhavis multajn ________.
19. Malaktiva gaso (inerta). Oni uzas ĝin en lampoj.
21. Por eraro, Veroniko kaj Roĝero iros al la ______ klaso.
22. Tuktruk estas la tendareja ______o.
23. Veroniko estas tendara gvidant___o.
24. Inter du montoj estas _____o.
25. Malbona Ŝipo (mallonge)

*Respondo fine de la gvidilo*

**Konsiloj:**
Kaŝu objekton dum iu forestas. Tiu demandu per 'ĉu' pri ĝia loko por trovi ĝin.
Donu kaj ricevu objektojn en la grupo. Petu afable. Lernanto komentariu: Li donas la pomon al ŝi. Ŝi ricevas la pomon de li. Ŝin dankas lin." ktp.

# 8. Trovu la vojon!

**Novaj verboj:**
voki -on, aŭdi -on, paroli (lingvon), (mal)fermi –on, pied-iri, halti, rol-ludi.

**Aliaj novaj vortoj:**
mapo, turisto, angulo, teko, halt(ej)o, linio, informo, kinejo, parko, asocio, kapo, brako, strato, pasaĝero, usona, detala, preciza, kolora, proksima, stranga, interesa, certe, ĝis.

**Gramtikaj celoj:**
1. Kombino de temoj el la lastaj lecionoj, ekz. imperativo kaj demandado.
2. Uzo de la nova prepozicio: ĝis (kune kun ĉe kaj antaŭ)

**Komunikaj celoj:**
1. Petado kaj donado de direktoj sur-strate. Uzado de urbaj trafikiloj.
2. Braveco en konflikta situacio; defendo de siaj propraj rajtoj.
3. Enkonduko de pli ampleksaj rol-ludoj.

---

### Ekzerco 1: Vort-difinoj

*Parigu la vortojn kun la difinoj. Unu difino estas superflua. kiun vorton ĝi difinas?*


| | | |
|---|---|---|
| 1. butiko | A: | apuda, nefora |
| 2. ĉemizo | B: | loko kie oni resanigas malsanulojn |
| 3. prezidanto | C: | dokumento kiu helpas nin trovi la vojon. |
| 4. mapo | Ĉ: | persono en veturilo kiu ne ŝoforas. |
| 5. stacidomo | D: | vendejo |
| 6. preciza | E: | vojaĝanto kiu volas ekkoni aliajn lokojn kaj landojn. |
| 7. pasaĝero | F: | gvidanto kaj ĉefo |
| 8. turisto | G: | loko kie venas kaj foriras trajnoj |
| 9. proksima | Ĝ: | vestaĵo por la supra parto de la korpo. |
| | H: | certa, ne proksimuma aŭ duba |


## Ekzerco 2: Manka poezio

Jen kelkaj poemoj. Sed la poem-malamanto Mika Tastrof atakis la strofojn, kaj forportis la lastan vorton de la lasta verso. Per la helpo de la rimo kun la supra verso, vi kompletigu la poemojn!

❶

Elefanto kaj ĝirafo
Eĉ virŝafo
Bestoj grandaj, longaj, strangaj
Varm- kaj malvarm-sangaj!
Jen la sceno post alveno
Ĉe la urba ____-________.






❷


Kanguruo senpasporte
Bus-transporte
Ambasadon celas – kian?
Evidente, aŭstralian!

Al informisto per grandega salto:
Diras li: "Eliru ĉe la tria _______."



❸

Instruisto kun kolero,
"Vi," sen tolero
Al studento laca krias:
"Ne komprenas, nulon scias,
Ĉar vi persiste dormas,
Dum mi al vi ________.




❹


Jen denove kun malfruo
Pro aŭtaĉa fluo.
Ĝis alvenos bus' aŭ tram'
Mi pensiulo estos jam!

Vojaĝi kun mien' espera
Jen la devo __________.



❺

Naĝas hom' en ursa pelto
Al la Nila delto.
Post alven' marborda:
"La poluso norda,"
Jen demand' eskima:
"Ĉu estas ĝi ________?"



6

Sen pafilo, sen paf-arko
meze en Ĵurasa Parko
Mi ne volas esti eksa
en atak' Tiranosaŭro Reksa
Por sukceso en eskapo
Rigardu ni al jena _______.

*Vidu respondojn fine. Se la tasko tro malfacilas por viaj lernantoj, donu liston de la solvo-vortoj, sed kun la literoj miksitaj!*

---

## Dialogu:

**La bus-veturo. Jen informiloj en la urbo-centra bus-stacio:**


| **Linio 1** – Kajo 5 | **1** | **2** | **3** | **4** | FINSTACIO |
|---|---|---|---|---|---|
| | amuz-parko | kinejo | dentisto | teatro | besto-ĝardeno |

| **Linio 2** – Kajo 8 | **1** | **2** | **3** | **4** | FINSTACIO |
|---|---|---|---|---|---|
| | muzeo | butikoj | policejo | art-galerio | monto-pinto |

| **Linio 3** – Kajo 9 | **1** | **2** | **3** | **4** | FINSTACIO |
|---|---|---|---|---|---|
| | hospitalo | aŭto-riparejo | lernejo 'Zamenhof' | kastelo | haveno |

Pasaĝero kaj informisto dialogas! Vi dialogu simile:

**P:** Saluton. Mi vizitos la besto-ĝardenon. Kiun bus-linion mi uzu?
**I:** Uzu bus-linion unu.
**P:** De kie la buso ek-iras?
**I:** De kajo kvin.
**P:** Kiom da haltoj mi veturu?
**I:** Iru ĝis la kvina halto.
**P:** Kiu estas la finstacio de tiu buso?
**I:** La besto-ĝardeno estas la finstacio.
**P:** Koran dankon.
**I:** Ne dankinde.
Ĝuu la restadon en la besto-ĝardeno!



*Bildoj de Karina*

# 9. Navigu komputile!

**Novaj verboj:**
komenci -on, fini -on, ((puŝi -on)), pasi, navigi, pensi.

**Aliaj novaj vortoj:**
Konstruaĵ-nomoj, teatro, hotelo, policejo, ktp. trafiko, rezulto, instrukcio, multaj, kelkaj, perfekta, tie.

**Gramtikaj celoj:**
Prepozicioj: ĝis, ĉe. Dekstren, maldekstren.
Fizike demonstreblaj transitivaj verboj. Uzo de la verbo "daŭri"


**Komunikaj celoj:**
Mapo-legado. Dono kaj sekvo de precizaj navigaj instrukcioj. Uzado de komputiloj.

---

**Ekzerco 1: Kiom daŭras?**

**Horaro:**

08.00 La grupo atingas la bus-haltejon.
08.05 Buso alvenas al la tendarejo.
08.50 Buso alvenas al Karvilaĝo.
09.00 Trajno foriras de Karvilaĝo.
10.30 Trajno alvenas al Forurbo.
10.42 Alveno al la bus-haltejo.
10.55 Buso 2 foriras de la bus-haltejo.
11.05 Buso 2 alvenas al la bus-haltejo.
11.10 La tendaranoj aĉetas glacikremojn en la restoracio.
11.40 La tendaranoj ekpromenas.
11.55 La tendaranoj atingas la bestoĝardenon.
12.00 La malfermo de la bestoĝardeno.



**Kiom daŭras...**

1. la busvojaĝo al Karvilaĝo?
2. la trajn-vojaĝo al Forurbo?
3. la atendo por la buso en la vilaĝo?
4. la atendo por la buso en Forurbo?
5. la paŭzo por glacikremoj?
6. la bus-vojaĝo en Forurbo?
7. la promenado al la bestoĝardeno?
8. la atendo antaŭ la bestoĝardeno?
9. la vojaĝado en la tri veturiloj?
10. la vojaĝado en busoj?
11. la vojaĝado ekster Forurbo?
12. atendado (por busoj kaj ĉe la bestoĝardeno)?

**Ekzerco 2: Verboj**

Jen frazoj kie unu verbo mankas. Kiu verbo? Skribu la komenc-literon en la spaco kaj vi formos sekretan frazeton.

1. Ili __________ la konstruadon en aprilo. Tio daŭros ses monatojn, ĝis oktobro.
2. Mi ne vidas la aviadilojn, sed mi _______ iliajn bruojn.
3. Mi perdis mian monujon hieraŭ en la kinejo. Eble bona, honesta homo ________ ĝin kaj redonis ĝin.

4. “Staru!” “Kuru!” “Haltu!” ________ la kapitano. Jen tri ordonoj.
5. La kuko estos preta kiam ni ______ la kuiradon.
6. En la vespero ni ________ televidon.
7. Mi ricevis monon. Ni iros al la butikoj kaj ni _______ novajn ludilojn.
8. “Mi ________, do mi estas.” skribis Descartes.
9. Mapo _______ kie estas montoj, riveroj kaj vojoj.
10. Mi perdis niajn biletojn. Mi ______ ilin tra la tuta domo.
11. _______ la pordon! Envenas malvarma vento!
12. Buso frapis kamionon. Ve! _______ akcidento.
13. “________” kriis Veroniko al Luiĝo, “La buso foriros sen vi!”
14. “________ al mi. Mia numero estas 38 55 24.”
15. Adelo malfermis la sakon kaj ______ grandan sandviĉon.

Elektu el: aĉetos, aŭdas, elprenis, fermu, finos, indiki, komencis, okazis, ordonis, pensas, rapidu, rigardis, serĉis, telefonu, trovis.

Sekreta frazo:

____ ____ ____ ____ ____ ____ ____ ____ _____ ____ ____ ____ ____ _____

**Ekzerco 3: Kion oni faras tie?**

Ligu la lokon (maldekstre) kun la agoj de la loko (dekstre)

| **Kie** | | **Kion oni faras?** |
|---|---|---|
| 1. Banko | A: | Rigardas filmojn kaj manĝas grandajn potojn da puf-maizo. |
| 2. Hospitalo | B: | Rigardas kaj aŭskultas aktorojn, kiuj prezentas rakonton. |
| 3. Besto-ĝardeno | C: | Rigardas stelojn tra teleskopo. |
| 4. Art-galerio | C: | Ricevas monon el konto kaj donas monon por konto. |
| 5. Kinejo | D: | Montras historiajn objektojn al la publiko. |
| 6. Muzeo | E: | Manĝas, trinkas, pagas, forgesas ombrelon. |
| 7. Observatorio | F: | Montras bestojn al la publiko (kaj inverse). |
| 8. Stacidomo | G: | Donas leterojn kaj aĉetas poŝtmarkojn. |
| 9. Policejo | G: | Helpas malsanajn homojn. Ili estu sanaj denove. |
| 10. Restoracio | H: | Montras bildojn al la publiko. |
| 11. Teatro | H: | Trafas kaj maltrafas trajnojn. Atendas malfruajn trajnojn. |
| 12. Poŝtoficejo | I: | Raportas pri perditaj objektoj kaj krimoj. |

Starigu “Ĉu” demandojn pri la informoj.

**Konsiloj**

1. Permesu al la lernantoj desegni aŭ konstrui modelan urbon, kun la nomoj de la stratoj kaj konstruaĵoj. Ili rol-ludu – estu vizitanto al la urbo, kiu petas navigan helpon. La lokulo donas informojn. Dua vario: Estu tri lokuloj, du donas malbonajn informojn, nur unu donas bonan. La grupanoj decidu, kiu diras la veron.

2. Elsendu unu kursanon, kaj kaŝu objekton – premion – ie en la kursejo. Elektu direktiston. Tiu donas instrukciojn, “Iru dekstren”, “Iru al la fenestro kaj turnu vin maldekstren”, “Serĉu nun.” ktp. Alia kursano kun horloĝo kalkulu la sekundojn ĝis la trovo kaj raportu tion. Ripetu tion. Kiu trovos la premion plej rapide?

# 10. En la besto-ĝardeno

**Novaj verboj:**
vivi, kolorigi -on, kompreni -on.

**Aliaj novaj vortoj:**
*Besto-nomoj, koloroj,* vosto, strio, punkto, ĝibo, dezerto, alta, dika, inteligenta, feroca, sovaĝa.

**Gramtikaj celoj:**
Lerni multaj adjektivojn kaj la kolorojn.
Akordigi adjektivojn en nominativo: -aj -oj.

**Komunikaj celoj:**
Nomi kaj priskribi bestojn; priskribi homojn kaj objektojn, lau koloroj, formo kaj aspekto.
Kompreni kaj paroli pri amuzado en besto-ĝardeno.

---

**Ekzerco 1: Koloroj**

Jen la literoj de la koloroj, en alfabeta ordo. Kiuj estas la koloroj? Ligu ilin kun la numeritaj cirkloj dekstre.

1. AĜRU
2. ADERV
3. ABLU
4. AAFLV
5. AABKLN
6. AGINR
7. AGIRZ
8. ABNRU
9. AĜORRUZ
10. AAĜKLNOOORR




**Ekzerco 2: Besto-versoj.**

Jen du-versaj poemetoj. La lasta vorto mankas. Tio estas la nomo de besto. Uzu la rimon kaj aldonu la besto-nomon.

1. Por long-kolulo, nek teo, suko, kafo,
   Nur akvo por ___________.

2. Kaj en nordo, kaj en sudo,
   Domon havas la _____________.

3. Gvidanto kaj helpanto,
   Alte sur la _____________.

4. Grimpu tuj al dom'tegment'
   Se surplanke glitas la __________'.

5. Kolore kurioza la afero
   Rozruĝa estas la ______________.

6. Amuza, vigla besto: kio?
   Certe estas la __________.




7. Dezerte kun la sun-ombrelo,
   Sur la dorso de ___________.

8. Verdo, bluo, bruno, flavo
   Vost-koloroj de la __________.

9 En miel-biskvita manĝ-konkurso
   Gajnos certe bruna _________.


10 Jen la birdo antaŭ kovo,
   Simpla ronda eta _______.

Prenu la komenc-literojn de bestoj laŭ la numeroj por sekreta objekto. Ĝi estas ludilo:

□ □ □ □ □ □ □ □ □

8 9 5 3 2 4 11 1 10

**Aktiveco:**
Kolorigu la birdon (papagon) laŭ la numeroj kaj la indikoj.



| | |
|---|---|
| 2 | verda |
| 3 | flava |
| 4 | oranĝa |
| 5 | bruna |
| 6 | nigra |
| 7 | griza |
| 8 | ruĝa |
| 9 | blua |

*(La bildo prenita el kajero unu de la kompleto "Urso-kurso", eldonita de ETA, la brita landa sekcio de ILEI)*

# RESPONDOJ AL EKZERCOJ

***Leciono 2: Kiu por kiu? Unu solvo:***

Laŭ frazo 3 kaj 6: Boato tri estas por Aniko.
Laŭ frazo 2: Boato du estas por Petro, Aniko aŭ Natalio,
Aniko jam havas boaton.
Laŭ frazo 5: Ne estas por Petro. Do, estas por Natalio.
Laŭ frazo 4: Boato kvar ne estas por Petro. Restas nur Karlo.
Fine, restas nur Karlo kaj boato unu.

***Leciono 3: Kiam vi estos en la naĝejo?***

***1.*** C; ***2:*** A,C,Ĉ,D; ***3.*** B; ***4:*** C,Ĉ,D,E; ***5:*** la sepa; ***6:*** la dua;
***7:*** 4-6h.; 2-4h kaj 6-7h; neniam *(necesos eble enkonduki tiun vorton!),* 1-2h kaj 7-9h.

***Leciono 4: Kion oni bezonas?***

SUKERAĴ-SKATOLO

***Leciono 7: Mankantaj vortoj***

BILETOJN

***Leciono 7: krucvortenigmo***

| | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | T | R | O | V | O | S | |
| | | R | I | V | E | R | E | |
| | | A | M | | N | O | R | D |
| | | N | O | M | D | | Ĉ | |
| | | S | | O | A | Z | O | |
| | | P | E | R | D | O | S | |
| | | O | R | D | A | N | | |
| | T | R | A | | S | O | N | |
| | | T | R | U | | | E | |
| | K | I | O | N | I | V | O | |
| M | A | L | J | U | N | A | N | |
| Ŝ | T | O | N | A | | L | O | |

***Leciono 8: Manka poezio***

1. best-ĝardeno. 2. halto. 3. informas. 4. pasaĝera. 5. proksima 6. mapo.

***Leciono 9: Verboj***

KATO FRAPIS FORTE

***Leciono 10: Besto-versoj***

1. ĝirafo 2. testudo 3. elefanto 4. serpent' 5. pantero
6. simio 7. kamelo 8. pavo 9. urso 10. ovo

PUPET-SEĜO